
DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ N-ro 3 (840) 2003 ✪



*Sur la bildo: La Regno de Dio estas justeco kaj paco kaj ĝojo en la Sankta Spirito*

(Romanoj 14:17)

## LIMOJ KAJ EBLOJ
## LA BIBLIO EN ESPERANTO
## DEKALOGO

# KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*



**Prezidanto:** Jacques TUINDER
✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerk ✆+31 251 231941;
💻 d.tuinder-dekker@wolmail.nl

**Sekretario:** Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando; ✆+31 1724 20222;
💻 j.a.van.dijk@hetnet.nl

**Kasisto:** Siegfried KRÜGER
✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn, Germanio; ✆+49 7131 162688;
💻 SLKrueger@gmx.de



**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,– ✪ Membro-subtenanto €30,– ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,– ✪ pagante al Libroservo €18,– Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908 dumonata revuo — ISSN 0167-9554**

**Redaktoro:** Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆+33 (0)5 49 46 80 21;
💻 diaregno@altern.com.

**Abonprezo** sen membreco en KELI: €16,– aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado kaj ekspedado:**
Eldonejo HEJME Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
✆+4832 2650038; 💻 esperanto@hejme.e-tools.pl


## ENHAVTABELO


51 Limoj kaj ebloj
53 Mi meditas — vi kunmeditu
55 La Jaro de la Biblio 2003 — kion ni havas en Esperanto?
57 Ĉu la dekalogo ankoraŭ estas aktuala?
63 La numerado de la dekalogo
64 Pripensoj pri la preĝo „Patro nia"
64 Kelkminuta meditado
65 Preĝo por ĉiu tago
66 Kiel ni legas nian Biblion?
68 KELI-Prezidanto helpocele vizitis eksajn infansoldatojn en Srilanko
— kaj apud ili kutimaj eroj...


## REDAKTORAJ VORTOJ

Karaj gelegantoj,

Alproksimiĝas la eŭropa somero, periodo de pilgrimado kaj vojaĝo por multaj. Pluraj inter vi havos la okazon renkontiĝi. Por la aliaj, nia revuo estas la ligilo. Dum kelkaj monatoj mi havis stokon da kontribuaĵoj. Nun tiu stoko malgrandiĝas. Mi denove alvokas al verkantoj (ontoj). Vi ricevos la revuon kiun vi faros.

La elano de Pentekosto portu vin al pliaj atesto kaj respondo pro la Dia graco.

Philippe COUSSON



# LIMOJ KAJ EBLOJ

Niaj vivoj okazas inter limoj kaj ebloj. La senkreda homo havas nur vertikalan dimension. La Dikredanta homo havas ankaŭ kaj vertikalan kaj horizontalan dimension. Do la eblo por la nekredanto estas la ekkono de la horizontala dimensio, la renkonto kun Dio kaj la sekvado de Jesuo Kristo. Ili donas perspektivon. La eblo de la diohava kredanto estas resti kun la Kreinto, ne cedi al la fraŭdo de Satano.

### Limoj

La plej granda limo estas la ĉimonda vivo. Ĝi estas limigita por ĉiuj.

### Krimo

Ĝi lasas nur vertikalan ekzistadon, do la kulpulo ne havas perspektivon, eternan vivon.

### Malriĉeco

Multe da malriĉaj homoj ne konas Dion, ne vizitas preĝejon, ne edukas siajn gefilojn religie.

### Treriĉeco

Ĝi estas pli danĝera stato. Tiuj personoj povas fariĝi tre memfidaj, fieregaj. Ili pensas ke la mortanto povas prosperi sen la helpo de Disinjoro. Nur ni pensu pri la historio de la kamelo kaj kudrilo.

### Senkomunumeco

La moderna homo ofte fariĝas solulo. La gefiloj forlasas la familian domon. La geedzoj divorcas. La geavoj iras en malsanulejon. La fratoj vivas eble sur aliaj kontinentoj. Multaj restas solaj, eĉ en la grandaj festoj. Anstataŭ la apuduloj ĉirkaŭas nin la maŝinoj, kiel televidilo, radioricevilo, komputilo, ... La homo vere estis kreita por la komuna estado, do ili toleras malfacile solecon. La memmortigoj okazas plej ofte en la vespero de Kristnasko.

### Malsano

Ankaŭ ĝi estas limigo, ĝin spertas ĉiu homo.

### Indiferenteco

Tiu vivomodelo ĉefe regas en la tute junaj kaj tute maljunaj rondoj. Signifa parto de la adoleskuloj ekstere estas ekscesa, bunta kun malpraktika, vestaĵoj kaj frizaĵoj, sed interne, anime, kion la vizaĝo reflektas estas indiferenteco. Ili ne havas perspektivon, horizontecon, nek ĉi-monde, nek transmonde. Ili jam ne kredas en socialismo, kaj ne konas kristanismon. Ili vidas la riĉaĵon de iuj landoj kaj iuj popoltavoloj enlandaj, la malriĉaĵojn de aliaj landoj kaj inter iuj socioklasoj enlandaj. Jam oni diris ke kapitalismo estas infero, socialismo edeno. Nun oni diras male. La junuloj ne konas la mezan vojon.

Ili ne konas la devizon: Dio, Patrio, Familio.

Ankaŭ ofte estas indiferentaj la maljunuloj, iom kompreneble, ĉar ili multfoje seniluziiĝis. Mi estas en mia 63-a jaro kaj mi travivis sep sociordojn. Tiuj promesis al ni paradizon, el kiuj realiĝis nenio. Kiu trompiĝis sesfoje, tiu ne kredos la sepan

fojon en la mondaj promesoj. Nia Sinjoro Jesuo Kristo restis sama antaŭ cent, mil, dumil jaroj, eterne. Mi kutimas diri al la rnaljunuloj~apuduloj, la deprimitaj olduloj, preparu vin por la renkontiĝo kun la Eternulo. Poste kun la apuduloj, la gepatroj, geedzaj paroj, kaj aliuloj, ne estu indiferentaj, vi havas eblon ankaŭ en la hospitala lito.

### Tutmondiĝo

La vivo de sana homo estas ondforma, ĝi havas montojn kaj valojn : naskiĝo, geedzeco, profesiaj sukcesoj kaj malsukcesoj, senmoneco, retiriĝo. La ĝojon sekvas la tristo, kaj male. La vivolinio de la uniformigita homo glatiĝas, ĉio estas sama laŭpersone, laŭlande, laŭsocie. Tiu monotoneco kontraŭas la homan karakteron kaj gvidas al pesimismo. Ni pensu je la antaŭa epoko kiam ĉiuj estis membroj en la sama sindikato, ni vizitis ŝtatan lernejon, en la kvindekaj jaroj ni ĉiuj portis la saman veston, signifa parto de la loĝantaro ankoraŭ nun loĝas en skatolaj domoj en la tiel nomataj „abelujoj". Nun mi loĝas en tia vilaĝo kie la plimulto estas katolika, do oni ofte diradadas ke kial ni bezonas protestantan komunumon, kalvinanan preĝejon. Laŭ ili unu kristana preĝejo sufiĉus ĉe ni. Estu samaj! Estu samaj! Signifa parto de la hungaroj havas deprimon. Ni estas samaj.

### Ebloj

Ĉiu grupo havas limojn, sed ni devas emfazi ankaŭ la eblojn. Antaŭ mil cent jaroj niaj prauloj okupis la karpatbasenon, ĝi estis eblo. La limo estis paganeco, do nia reĝo Stefano forigis tiun limon kaj baptigis la popolon.

En la Reformacia epoko la simplaj loĝantoj/servutuloj ne vizitis lernejon, do estis senalfabetoj, do ili ne sciis kultivi la hungaran kulturon.La limo estis la manko de instruado, la manko de hungaraj lernejoj. Do oni fondis tiujn lernejojn, la instruitoj renovigis la hungaran lingvon, tiel kreiĝis la ebloj. Post la disfalo de la ŝtatpartia sistema, nia lando estis izolita. Do la eblo estis malfermo al la eŭropaj aliancoj. Mi ne ĝojas ke la unua estis NATO.

Ne. nur la socio, sed ankaŭ la familioj estas en krizo. La eblo je la restaŭro de la kristanaj familioj estas la akceptado de Jesuo. Se iu geedza paro volas divorci, ili rememoru je sia nuptoĵuro „ĝis via morto ĝis mia morto". Se iu patrino deziras mortigi sian embrion, pensu, ke la bebo estas la beno de Dio, frukto de la amo kaj la amo estas men Dio. Se iu volas forŝteli aŭ trompi sian najbaron, konaton tiu ekkonsciiĝu, ke la viktimo estas frato, ĉar ĉiuj devenas de nia kreanta Dio. Do, ni devas forigi la limojn, kaj proksimiĝi al la ebloj. Ĝin ni povas realigi nur per la helpo de la Savanto.

En medicino nur, Jesuo Kristo ne havas limojn. Li kuracis riĉajn kaj malriĉajn homojn, ne diferencigante ilin, eĉ kiel ni scias li revivigis Lazaron. Por la homo la morto estas absoluta limo. La Savanto kuracis ankaŭ sabate, kuracis ankaŭ tiujn kiujn la socio eligis, kuracis tiujn kiuj per la homoj estis nekuraceblaj.

### Ebloj de la mortantaj medicinistoj

Ni scias plilongigi la vivon, mildigi la doloron rekapabligi la invalidojn. Tion povas fari ĉiu kuracisto. Multfoje la paciento ne volas resaniĝi ĉar li vidas nur la limojn, ke li post la resaniĝo ne povas vivi kompletan vivon, ke li devas pensiiĝi, konsumi medikamentojn, do li/ŝi ne povos vivi la vivon de la junuloj.





# MI MEDITAS — VI KUMNEDITU!

Alparolis min vorto el epistolo al Hebreoj 3,14: „*Ĉar ni fariĝis partoprenantoj de Kristo, se la komencon de nia certiĝo ni tenos firme ĝis la fino*". Ni pripensu la situacion de adresatoj. Temas pri kredantoj el Izraelo, kies kredo estis profunde malfortigita. Venis persekutado kaj multaj perdis sian posedaĵon (10,34). Elkreskis demando, kion ili fakte akiris ekkredante Jesuon. Ne sufiĉis resti en la antaŭa juda pieco? Per nova vojo ili perdis la kontakton kun la templo kaj la sinagogo. Kredo al Jesuo kreis barilon inter ili kaj la iamaj judaj kunkredantoj. En tia situacio havas la tuta epistolo unu ĉefan temon: montri, ke ĵus kredante Jesuon ili estas fidelaj izraelidoj. Ĝuste en Kristo plenumiĝas ĉiuj simboloj de la Malnova Testamento. Forlasi Kriston signifas

Delonge la pacientoj ne estis tiom orientitaj en la apotekoj, ili kredis en la doktoroj. La pacientoj vizitis ilin ankaŭ ĉi-kaze se ili translokiĝis malproksimen aŭ pensiiĝis. La nuna pacientaro fanatike konfidas en la medikamentoj. Ili estas tiuj kiuj mendas la kuracilojn. Ili petas tiujn, tiujn kaj aliajn. Se la kuracisto lacas, li preskribas la petitajn aĵojn, kaj adiaŭas. Se li havas energion, konvikas la pacienton pri la bezono de la ekzameno.

Tamen la efikoj de la medicinoj estas limigitaj kaj ankaŭ la kuracis povas morti. Se ni estas nekredeblaj ĉi-tie estas la fiasko. Se ni ambaŭ estas kredantoj (medicinisto kaj paciento), ni scîas ke la kuracisto aŭ apotekisto estas nur rimedoj en la mano de la Disinjoro. La amo estas duonresaniĝo. La amo estas mem Dio. La doktaro povas esti senpova, la medikamento senefika, sed la amo, Dio estas eterna kaj ĉiopova.

Multaj demandas, kial mi dediĉas en ĉiu monato unu sabaton por la agado de la organizaĵo de la kristanaj kuracistoj. Tial ĉar mi scias ke la homa scio finiĝas, sekvos la Dia zorgado. Se la paciento estas nekuracebla, eble li povas vivi nur ne tute sane kun la problemoj, ni povos alvoki lian atenton pri la ebloj en la Tero kaj en la lando de la Sinjoro. Ĉe la morta lito ne estas nekredeblaj homoj! Se mi ne estas preparita por la tasko, mi petas pastoron aŭ psikologon. Neniam forgesu ke la homo konsistas el korpo, psiko kaj animo. Ni devas scii kiu estas la eterna kaj kiu la mortanta.

Mi estas nur dentkuracisto, kiu malofte renkontiĝas kun mortaj kazoj. Feliĉe! Tamen mi spertas ĉiutage ke la religiemaj malsanuloj pliofte kredas ke se mi diras ke la operacio ne dolorigas kaj havas pli da toleremo por alkutimiĝi al la protezoj. Estas sciate ke la timo kaj la alkutimiĝo en nia fako estas pli grava faktoro ol ĝenerale en la medicino. Eĉ mi kutimas emfazi, se ĝi estas bezonate, ke ni kredantaj partneroj estu sinceraj, komprenataj unu al la aliaj.

SZEMŐK Balázs

perfidi la ĝisnunan kredon, pro tio ĉio rememoras Paŭlo gefratojn. Ili fariĝis partoprenantoj de Kristo. Ni primeditu tiun eldiron!

Mi eliras el la esperanta teksto. Mi do konstatas, ke temas pri kunmetita vorto el du esprimoj: parto kaj preni. La unua vorto avertas min, ke mi havas ĉe Kristo certan parton por mi destinitan. Certe, por ĉiuj havas Kristo donacon de pekpardono, de Sankta Spirito, de eterna vivo, de sia ĉeesto... sed mi akceptas tion persone per mia propra menso, mi travivas savon kiel individuo neripetebla, pro tio travivaĵo de mia savo enhavas ion neripeteblan. Por sia servo al Kristo havas ĉiu kredanto sian „parton" preparitan ĵus por si mem (Efe 4,7). Tiu „parto" certe dependas de tio, kion Paŭlo nomas „*mezuro de fido*" (Rom. 12,3). Ankaŭ en travivaĵo de pento ni diferenciĝas. A. Schlatter skribas: „Ĉiu pento havas sian amarecon. Alia estis pento de Mateo, alia de Paŭlo...".

La dua radiko en vorto partoprenantoj estas verbo preni. Mi jam diris, ke Dio preparis mian parton en savoplano. Sed estas mia tasko tiun parton preni, ekkapti, alproprigi ĝin, pli profunden ekkoni, en vivo konkretigi. Kiagrade ni efektiviĝas tion, tiagrade ni spirite kreskas. Izraelo venis en kananan landon, sed li devis ĝin ekposedi (Jos 18,3). La dua parto de dekkvara versiklo eldiras kondiĉon, kies plenumo konservos nin en partopreno en Kristo. Ni devas plenkonscie firme teni nian komencan kredon kaj esperon. Ni ja konas instigojn al kresko, maturiĝo. Sed ni renkontas ankaŭ admonojn al reveno, al komenco. Se ni maltrafis la direkton, ni devas reveni. Pro tio ni legas admonojn: *Sed mi havas kontraŭ vi, ke vi forlasis vian unuan amon. Memoru do, de kie vi falis, kaj pentu, kaj faru la unuajn farojn!* (Apo 2,4–5). Teologo Dr J.L. Hromádka skribis iom provoke: „Kristanismo ne estas progreso sed reveno". Ankaŭ similan eldiron mi nun rememoras: „Ĉiu progreso en kristana vivo estas disvolviĝo de tio, kion homo ekkaptis en unua akcepto de savo". Tiusence mi komprenas la admonon firme teni la „unuan certiĝon".

Ankoraŭ ni pripensu la unuan vorteton de nia versiklo: „ĉar". Tiu vorteto kunigas versiklon dekkvaran kun la antaŭa. Ni legas tie pri „trompeco de la peko". Ni estas senĉese en danĝero de spirita trompo. Entute estas karaktero de la peko, ke ĝi trompas nin. Nian eraron ni bedaŭrinde tro malfrue ekkonas. Resti longe en trompostato kaŭzas obstinon de la koro. Homo fariĝas pli kaj pli nesentebla la voĉo de konscienco. Pro tiu danĝero ni devas rememori, kia nekomparebla heredo en Kristo estas endanĝerigita kaj pro tio grave konservenda.

Laste ni rememoru kelkajn versiklojn, kiuj konkretigas nian partoprenon en Kristo:

Ni havas partoprenon en la potenco de releviĝo (Fil. 5,10). La sama potenco, kiu revenigis Kriston en vivon, energias en ni kaj ebligas forlasi la vivon de egoismo, malamo, envio, memvolo. Kontraŭe, la sama energio superlevas nin al la vivo de amo, servo, sindono, ofero, kaj kreas en ni kvalitojn de nova homo laŭ la bildo de Jesuo Kristo.

La sama versiklo parolas pri partopreno en suferoj por Kristo. Profunde spertas ilin kredantoj en Indonezio. Sed ankaŭ ni estu pretaj por tiu partopreno, kie la vojo de kredo tion postulos.

Jesuo vokas nin partopreni en granda spirita batalo kontraŭ la potencoj de malbono: „Kiel la Patro sendis min, tiel ankaŭ mi vin sendas (Joh. 20,21). Ni vidu ankaŭ vorton en Joh 17,11!

Jesuo vokas nin partopreni en lia ĝojo: „Tion mi parolis al vi, por ke mia ĝojo en vi restadu, kaj mia ĝojo estu plena (15,11). Apostolo Johano sole konservis por ni tiun mirindan promeson. La invito al ĝojo reganta en Triunuo — kiu kapablas ĝispensi tion!

Jesuo vokas nin al la unueco en la Triunuo (Joh 17,11). Unueco en la Triunuo estas mezuro al kiu ni devas celi. Kiugrade ni efektivigas nian unuecon kun Kristo, tiugrade ni kapablas krei ekumenismon!

Jesuo vokas nin al partopreno en lia gloro (Joh. 17,22). Tiel li kuniĝis kun ni, ke por la tuta eterneco li volas esti kun ni en la regno de la Patro.

La vorto pri la partopreno en Kristo gvidas min al memkontrolo, kiugrade konkretiĝas en mia vivo. En kio mi fiaskas? Provu ankaŭ tiun memkontrolon kaj atentu la vorton Jak 1,23–25.

Josef Pokorný

# LA JARO DE LA BIBLIO 2003 — KION NI HAVAS EN ESPERANTO?

La Germana faka revuo *Deutsches Pfarrerblatt*, n-ro 2(1960),15 januaro, paĝoj 34–36, enhavis artikolon de W. J. Downes, profesoro pri la Hebrea kaj Malnova Testamento en Western College de la universitato de Bristol, pri la historio de la Esperanto-biblio (rim.: tradukita el *Dia Regno*). La artikolo ankoraŭ konsulteblas en fakaj bibliotekoj kaj en kelkaj pastoraj domoj. Tre precizan kaj bone dokumentitan prezenton de la temo oni trovas en *Biblia Revuo* (Ravenna) 5(1969) nov.-dec., p. 261–278, el la plumo de George Rust: Historio pri la Esperanto-Biblio.

La Brita kaj Alilanda Biblia Societo en Londono unuafoje en 1912 eldonis „La Nova Testamento de nia Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo". Komitato respondecis pri la ĝusta redono el la greka originalo; la leonan parton de la laboro faris la anglikana pastro John Cyprian Rust.

Zamenhof, la iniciatinto de la lingvo, jam en sia Unua Libro liveris kiel modelan tekston la komencajn versiklojn de la Biblio, Genezo 1:1–10, kaj, surprize, la Patro-Nian — li ja estis judo.

Sisteman tradukon de la tuta Malnova Testamento li komencis nur, kiam montriĝis ke la brita komitato ne progresas. Ĉe Hachette en Parizo aperis, kiel apartaj kajeroj, La Predikanto, La Psalmaro, Sentencoj (de Salomono), Genezo, Eliro, Levidoj, Nombroj, Readmono. Zamenhof finis la tutan tradukon longe antaŭ sia morto en 1917. Sed dum la milito, pro la cenzuro ne eblis transporti la manuskripton al Londono.

Pasis ankoraŭ multaj jaroj, ĝis la tuta verko aperis en presita formo, en 1926, danke al la financado fare de du anglaj kvakerinoj, kaj prezentiĝis al la publiko dum solena Diservo en la katedralo de S-ta Giles en Edinburgo. Intertempe, unu represo sekvis la alian; neniu alia verko de la Esperanto-literaturo, escepte de lernolibroj, atingis similan eldon-kvanton.

Estas ege mirige, kian atuton atingis la fondinto de la Esperanto-lingvo per sia traduko de la plena hebrea biblio. Lingve kaj enhave eĉ nun ĝi plu estas aktuala. Multaj legantoj atestis, kiom rigardo al la Esperanto-Biblio helpis al ili pli bone kompreni neklarajn lokojn en la biblio, en epoko kiam modernaj tradukoj estis ankoraŭ raraĵo (kaj tiel statas la aferoj ankoraŭ nun en multaj lingvoj).

Momente, en Londono oni finas prepari novan eldonon de la konata Esperanto-Biblio. Tamen, unuafoje, inter la Malnova kaj la Nova Testamentoj staros la duakanonaj libroj, en pli fruaj biblioj ankaŭ nomataj apokrifoj. Oni presos ĝin en Hongkongo. Do, pasos ankoraŭ iom da tempo antaŭ ol la libroservoj ofertos ĝin.

La Novan Testamenton la komitato konsistanta el anglikanaj pastroj ja tradukis el la greka same skrupule kiel ZAMENHOF, sed ofte tro ekzakte kaj tro laŭvorte. Tion oni rimarkas precipe en la leteroj de Paŭlo.

Provoj por fari kompletan novan tradukon de la Biblio, „Ekumena Biblio", tamen ĝis nun fiaskis, kaj post la morto de la iniciinto, prof. Angelo DURANTI, verŝajne la entrepreno ne tre baldaŭ ree ekmarŝos.

Aliflanke, la laboro de la nederlanda teologo kaj klasika filologo, Gerrit BERVELING, jam portis videblajn fruktojn. Apartaj kajeroj de ĉiuj kvar evangelioj en lia traduko aperis en tre bela vesto ĉe FONTO en Brazilo: *La bona mesaĝo laŭ Marko*, *La bona mesaĝo laŭ Mateo*, *La bona mesaĝo laŭ Luko*, *La bona mesaĝo laŭ Johano*. Tie haveblas en du volumoj, kun klarigoj kaj helpaj pied-notoj, La duakanonaj libroj, do la malfruaj partoj de la Malnova Testamento, verkitaj ne hebree, sed greke. En 1999 aperis, same ĉe FONTO en Brazilo la biblia libro „Nombroj" (la kvara libro de Moseo), en nova traduko de BERVELING kun enkonduko kaj tre utilaj notoj (La eldonoj de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo, principe, enhavas nur la biblian tekston, sen iaj klarigoj aŭ referencoj al similaj bibliaj lokoj).

En DIA REGNO aperis pluraj novaj tradukoj, ĉiuj el la plumo de BERVELING — Romanoj, ambaŭ Konrintanoj, Galatoj kaj pluraj aliaj.

Interesa por ĉiuj posedantoj de komputilo estas la kompakt-disko „EspRom", eldonita de Germana Esperanto-Asocio en 1994. Krom amaso da aliaj tekstoj, ĝi surhavas la Londonan Biblion, tamen, pro teknika eraro, la unua libro (Genezo) ne estas kompleta. Nun ekzistas mini-diskedo „OekuRom", ok-centimetra, kun la plena teksto de du biblioj — la germana unueca traduko kaj la Londona Esperanta, kompletigita per la Duakanonaj libroj, sen la klarigoj kaj notoj, sed kun ĉiuj tekstoj de ADORU kaj midioj de ties melodioj, de la mes-libro, kaj la numeroj 1-45 de Oekumenisches Esperanto-Forum kun detalaj indeksoj.

Multajn bibliajn tekstojn en bela, bone legebla skribo prezentas la dua volumo de la oficiala roma meslibro „Legaĵaro", kiuj parte sekvas la Londonan tekston, sed aliparte liveras propran tradukon. La verko estas ofte uzebla same bone en protestantaj Diservoj.

Ni ne forgesu mencii ankaŭ malgrandan bild-libron kun bibliaj tekstoj, 96 paĝan, presitan en Hispanio en 1997 ĉe Editorial Verbo Divino, eldonita de „Kirche in Not" (van Straaten), prizorgata la la franca sekcio de IKUE, sub la titolo „*Dio parolas al siaj infanoj*".

Adolf BURKHARDT



# ĈU LA DEKALOGO ANKORAŬ ESTAS AKTUALA?

*Mia fervojista amiko Dieter Hartig, emerita lokomotivestro kaj protestanta laiko, prezentis dum la Esperanto-Tagoj 1996 en Loccum prelegon pri la aktualeco de la dekalogo.* (Siegfried KRÜGER)

## La dekalogo kaj la hodiaŭa moralo.

La dekalogo donas al la homoj liberecon, ĝi ne celas al limigo kaj subpremo. La unua frazo de la dekalogo en la dua Libro de Moseo, la Eliro, tekstas:

*„Mi estas la Etemulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la lando de sklaveco".*

Dio pruvas per tio sian rajton, postuli la dekalogon. Per siaj ordonoj li volas certigi, ke la popolo restu libera.La dekalogo estas ankoraŭ hodiaŭ nepre necesa kiel rimedo kontraŭ la morala dekadenco.

## Pri la unua ordono:

*„Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la lando de sklaveco. Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi".*

Kie Dio estas forigita, lia trono estas malplena. Sur ĝi eksidas tiu, kiu forpelis la Sinjoron, la homo. Anstataŭ nur du ordontabulojn li plenigas longegajn librobretojn per juraj kodoj. Per tio la homoj devas esti obeigitaj.

Kiam iu forlasis Dion, tiam li diras:

„Mi estas mia propra sinjoro, propra dio, mi ne bezonas fremdajn diojn".

La fundamenta monopolpostulo de la unua ordono levigas jenajn demandojn:

Kio estas pri Allah? Kio estas pri Buddha, pri la aliaj mondreligioj?

Por la mondpaco estus pli bone, se ĉiu homo povus mem decidi, kiu dio estas por li plej agrabla kaj plaĉa. Grave nur estas, ke oni ne elektas surogatajn diojn (kiel ekzemple monon, muzik-stelulojn aŭ futbalon. „La HSV (germana futbal-ligo) estas pli granda ol Dio" — „Tamen ĝi ĵus perdis la lastan maĉon kontraŭ Werder".

## Pri la dua ordono:

*„Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio; ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon".*

Multaj, kiuj agas en la nomo de Dio, perfortas aliajn homojn. Ili uzas la nomon de Dio kiel varbilo, kun la celo, trompi la homojn. Por tiuj homoj tekstus la dua ordono:

„Prenu vian parton en la nomo de Dio".

Estas facile por friponoj, trompi naivajn kredantojn. Ĉiutempe la kristanoj formis al si certan bildon pri Dio. Eksterordinare kruelaj religiaj militoj same kiel la klopodoj de la hodiaŭa ekumeno atestas plej diversajn dio-bildojn. Ĉe tio la kristanoj perdis ankaŭ ilian humilecon. Sed jam en la pra-kristanismo eksplodis inter la humila kredantaro la de ĉiuj ege kondamnita orgojlo. Ĝi estis unu el la plej gravaj impulsoj en la konkuro, kiun la multnombraj sektoj senkompate batalis unu kontraŭ la alia. Fakte, kiu orgojlo povus esti pli malbona ol la aserto, esti la posedanto de la sole vera kredo, kaj kiu per forto kaj ruzo klopodas realigi ĝin spite al kontraŭeco. Post kiam Moseo malsuprenportis la dekalogon antaŭ 3000 jaroj, la Alta Pastro solene el-

diris la vorton „Jahve" nur unufoje en jaro. Tiam la popolo sin ĵetis en la polvon kaj vokis ĥore: „Benita estu Via nomo eterne".

Hodiaŭ ni senpense diras: „Pro Dio!", „Dio mia!" aŭ oni blasfemas per Dio — sed la puno ne estas fulmo kaj tondro. Tiuj blasfemvortoj fariĝis senenhavaj parolturnoj. Ĉar tiuj vortoj ne plu signifas ion, ni hodiaŭ povas per ili nek blasfemi nek beni.

Prave, la dekalogo ne estas nuntempa, kaj vere ne necesas, ke ni protektas Dion. Sed kiu volas nin protekti kontraŭ politikistoj misuzantaj la religion kaj kontraŭ ekleziaj ĉarlatanoj, tiuj pro Dio devus pli alte taksi la duan Ordonon ol malŝate krii: „Ho, Dio miiiia!"

**Pri la tria ordono:**

*„Memoru pri la tago sabata, kaj tenu ĝin sankta. Dum ses tagoj laboru kaj faru ĉiujn viajn aferojn; sed la sepa tago estas sabato de la Eternulo, via Dio; faru nenian laboron"...*

Dum la labortagoj la superstreĉitaj nervozaj homoj preferas je la semajnfinoj alian manieron de trankvilo ol la laciĝitaj korpoj de niaj prapatroj. Sed hodiaŭ la semajnfino estas „eksmoda afero". La hodiaŭa homo kondutas ekde vendredposttagmezo, kvazaŭ la tria ordonu tekstus:

„Klopodu, ke vi iel mortbatas la sabaton!"

Per la tria ordono la homo servis kaj Dion kaj sin mem. Dio ja donacis al si mem kaj al la naturo tutan tagon por ripozi. Hodiaŭ montriĝas, kiel plej prudenta decido povas esti nuligata. El bonfarto fariĝis turmento.

Jesuo diris: „La sabato estiĝis por la homo, kaj ne la homo por la sabato" (Sankta Marko 2, 27). Kiam Li sabate sanigis la sekiĝintan manon de homo, oni intencis lin mortigi pro senhonorigo de tiu sankta tago. „Kaj Jesuo kun siaj disĉiploj foriris ĝis la maro" (Sankta Marko 3,7). El tio ni povas konkludi, ke ankaŭ prudentaj leĝoj devas adaptiĝi al la aktualaj bezonoj.

Per la realigo de la socialaj rajtoj ŝanĝiĝis la signifo de la tria ordono. Ne plu estas la homo, kiu aplikas la produktrimedojn, sed estas la produktrimedoj, kiuj pelas la homon. La instalaĵoj devas esti uzataj optimume, tio signifas, ili devas labori tagnokte. La malpermeson de la dimanĉlaboro la industrio konsideras „loka malavantaĝo".

Fakto estas, ke multaj homoj konsentas la novan manieron aranĝi la labortempon. Ili disponas semajntage pri pli da libertempo kaj multaj ripoz- kaj feri-lokoj (banejoj, ekskursceloj...) estas je semajnfinoj superplenaj. En la libera semajntago oni povas multon prizorgi sen peti pri feriotago. Krome la tempo por hobioj abundas tiamaniere. Pridubeble ja estas, ĉu la homo donas per tio al sia vivo pli da senco.

**Pri la kvara ordono**

*„Respektu vian patron kaj patrinon, por ke longe daŭru via vivo sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi".*

Infanoj traktas la gepatrojn plej ofte tiel, kiel ili estas edukitaj. Generacio, kiu estimas siajn infanojn, estos poste mem estimata.

Hodiaŭ tiu konduto estas neniel konsiderata. La hodiaŭa superokupita homo traktas siajn gepatrojn, kvazaŭ tekstus la kvara ordono:

„Respektu la patro- kaj patrino-tagojn, por ke vi bonfartu dum la resto de la jaro".

Konfliktoj inter gepatroj kaj infanoj estas same normalaj kiel la amo inter ili. La homaro sendube pereus sen la venkigklopodo de propra volo de la infanoj, kiuj celas ŝanĝi la mondon. Estas ja ankaŭ vana espero de la maljunuloj, ke la infanoj povus lerni el iliaj spertoj. La infanoj havas la rajton, mem spertiĝi.

„La hodiaŭa junularo apenaŭ respektas la gepatrojn. Ili estas profunde degeneritaj, plenaj da senpacienco kaj sen ĉia sinregado. Ili mokas pri la spertoj de la maljunuloj. Tio estas tre suspektigaj signoj". — Tiu eldiro aĝas 4000 jarojn kaj estis enkavita sur praegipta ŝtontabulo. Oni povas doni al siaj infanoj amon, sed ne siajn pensojn.

En la 50aj jaroj ŝokis nin „Halbstarke", „Rabauken", Rowdys" (germanaj esprimoj por tiamaj junuloj), en la 60aj oni kriis; „detruu, kio nin detruas!", poste tekstis: „Ni apliku la metodojn de niaj kontraŭuloj!" — la gepatroj fariĝis la viktimoj.

Ĉar hodiaŭ la familia planado okazas pli konscie, la rilato inter la generacioj profunde ŝanĝiĝis, kio montriĝis fatala. Pro la kreskanta laborenspezo la gepatroj pagas la al la infanoj ŝulditan amon, tempon kaj atenton en formo de mono. Tio estas unu el la cefaj temoj en la ilustritaj ĵurnaloj.

La vivoatendo konstante kreskas. La maljunuloj atingas ĉiam pli altan aĝon kaj la „bebokonjunkturo" jam de longe ĉesis. La „generacia arbo" similos baldaŭ al eksplodnubo de atombombo kun ia komparebla j socialaj sekvoj, anstataŭ la konata supre pinta abio.

Se iel eble, oni flankenŝovas la maljunulojn en maljunulejon, kie ili dormetas en plurlita ĉambro gis la morto. Hodiaŭ la mondspertaj maljunuloj vivetas enuige en hejmoj, kaj jam baldaŭ ili fermos por ĉiam la buŝon.

Perdiĝas ĉio, pri kio ili povus raporti. Kelkaj homoj ja ekkonas tiun perdon. Tion pruvas la kreskado de la memoriga literaturo. Kion la flankenŝovita avino manke de aŭskultantaro ne povis rakonti, aĉetas nun la geinfanoj kaj genepoj en la librovendejoj.

**Pri la kvina ordono:**

*„Ne mortigu".*

La vivo sur nia troplena tero fariĝas pli kaj pli malagrabla. Multaj homoj supozas, ke ni ne plu povas toleri tiun sentimentalan dekalogon. Ili vivas kaj agas kvazaŭ la kvina ordono tekstus:

„Supervenku ĉiun!"

La TV-sciigoj kaj la sekvanta ludfilmo konkuras per prezentado de perfortaĵoj. Ĉiam pli da „furiozaj raportistoj" estas survoje por provizi nin per la necesa nerva tiklosento. La ĉiutaga konsumo konsistas el krim-, vestern- kaj kruelaĵ-filmoj. La „Ŝtelisto de Bagdado", la iam plej ŝatata heroo jam de longe ne plu estas aktuala.

„La agresemo estas parto de nia animala heredaĵo, la posta homo perdis siajn ĝenojn, per kio venis murdo kaj milito en la mondon" — opinias kelkaj sciencistoj.

En ĉiuj urboj de la mondo oni devas konstante kuniĝi pli proksime. Ĉe tio malkreskas la valoro de homa vivo. „Ne mortigu" valoras por la civilizita homo, sed li toleras tamen iom post iom la teruraĵojn, li ja ne povas ŝanĝi la situacion.

Tro da homoj vivas tro dense kaj interkonfliktiĝas pli kaj pli ofte pro laborlokoj, salajroj kaj socialaj avantaĝoj. La reciproka ĝeno fariĝas neeltenebla.

Menciinde estas, ke Dio ne mortpunis la unuan murdanton de la historio, sed markis lin per la Kainsigno sur la frunto, por ke li estu elpelito. Nur la Montprediko ekskludis komplete la mortigon de la malamiko.

**Pri la sesa ordono:**

*„Ne adultu".*

Nenio tiel profunde sanĝiĝis, kiel la

imago de la homoj pri la seksa moralo. La tiom longe diable malpermesita kontentigo de la avideco kalkuliĝas hodiaŭ al homaj rajtoj, eĉ homaj devoj, kio jam la malnovan leĝon transformas en la malon:

„Adultu!"

Tiu se(k)sa ordono estas ĝenerale interesa.

La diskuto temas ĉefe pri la kontentigo de la avideco, ĉar sen la avido pri tio oni ja ne adultus. Sed ne nur pri tio la avido estas tiel diabla. La ideo pri asketismo de la praepiskopoj kondamnis la „volupton". Estis longa vojo de la volupto ĝis la hodiaŭa senĝenita instinkta amkontentigo.

Paŭlo rekomendis la ĉastecon en 12 el siaj 14 episkopaj leteroj. La demando, kio okazus, se ĉiuj kristanoj vivus kvazaŭ monaĥoj, estas sensenca spekulaĵo.

La socia evoluo ŝanĝis nian seksan moralon profunde. La sendependeco de la virinoj en profesio, tio estas la liberigo de dependeco de la viro, faris el li ankaŭ sekse propra-respondecan estaĵon. Sekure efikaj kontraŭ-koncipiloj forprenis de ŝi la timon pri nedezirita gravedeco.

Kion la viroj rajtas permesi al si, decidas la „malforta sekso". Tio signifas, ke la priseksa klimato de societo estas ina afero. Seksologio fariĝis lerneja instrumento, la antaŭ-edzeca koito fariĝis normala, adulton konsideras ekspertoj saniga, pornografio estas „anima medicino". Viro kaj virino estas sekse samrajtaj, grupa sekso kaj seksaj ludoj estas normalaj. Per tio transformiĝis volupto al virto.

Leviĝas la demando, ĉu homo ne nur intencas „fari amon", sed volas efektive ami. „Amo" estas absolute alia afero ol tiuj „seksaj kiĉaĵaj interrilatoj". Amo furiozigas profunde la homan animon.

LUTHER diris: „Mi amas vin, ĉar vi estas mia edzino". Hodiaŭ tio tekstas: „Ĉar mi amas vin, vi estas mia edzino".

La lastaj duboj pri la devojiĝo de la sesa ordono flankenŝovis la naturscienċan teorion; „Ne estas la malbona etiko, sed la genoj, kiuj pelas al adulto!" (Socialpsikologo Heinz MEYER, Aachen). Ĉar ĝenerale oni tenas la adultojn sub la litotuko, oni ne havas realan superrigardon pri la amplekso de tiu afero. Kio iam signifis „ligi iun al pilorio" (PIV), estas hodaŭ distingo.

Evidentiĝas el tio, ke la virinoj ĉasadas por kapti virojn, kiuj ne tro kontraŭs la ĉasamon. Ĉu la sesa ordono de Moseo ankoraŭ valoras en nia bela mondo? Kio estas „moralo"?? KINSEY, la „prapatro de la seksa esplorado" diris: „Moralo estas, kion la plimulto faras".

## Pri la sepa ordono

*„Ne ŝtelu!"*

Propraĵo ne plu estas respektata. Butikŝtelado fariĝis kvazaŭ popolsporto. Bagatelajn deliktojn oni apenaŭ persekutas. La ŝtato toleras la ŝteladon de miliardoj. Por la ordinara ŝtelisto valoras la modifita sepa ordono:

„Ne ŝtelu tro multe!"

„Pendigu la ŝteliston", postulis la Sachsenspiegel. Tio estas troigo kaj ne efikis, ĉar la poŝŝtelistoj priŝtelis dum la ekzekuto la gapantojn. Dehaki la manojn, kiel la Islamo postulas, naŭzas la okcidentulojn. Ĉe ni oni rezignas ĉe negrava kulpo la akuzon.

Magazenŝtelistoj apartenas al ĉiu tavolo de la popolo, Mastrinoj estas la plej multaj. La kialoj de la magazenŝtelado estas diversaj. Nur malmutaj ŝtelas pro mizero, plej multaj pro avido kaj nervotiklo. La magazenŝtelado estas senproblema, ĉar pro la raciigo la nombro da vendistoj estas rilate al la klientoj ege malgranda.

Mi legis en jarraporto: „Per forigo de perdoj pro ŝtelado ni povus atingi senteblan profitaltigon". Tio signifas, se la ŝtelisto priatentus la sepan ordonon, la profito de la kapitalistoj altiĝus senteble.

En la pratempo la sepa ordono celis ne nur al la ŝtelado, sed ankaŭ al la apliko de perfido, perforto, ĉantaĝo kaj detruo. Hodiaŭ gravas ankaŭ la deliktoj en labormedio: Eluzo de sociala mizero, la trompo de homoj pri parto da tarifita salajro, kaj la postulitaj altaj makleraĵoj por potempaj laboristoj. Ĉe elspeztrompo montriĝas plej okulfrape la morala dekadenco. Precipe kiam temas pri alies propraĵo la ideoriĉeco estas senlima.

Programisto ordonis komputilon de banko rondsumigi la de klientoj kontitajn transpagojn kaj kolekti la ronditajn monerojn sur propran konton. Post nelonga tempo la moneroj sumiĝis al miliono. Neniu konstatis tion kaj neniu sentis sin trompita. Per tio ni atingis la komencan aserton: „Ne ŝtelu tro multe!"

## Pri la oka ordono:

*„Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston".*

*„Kio estas vereco?"* demandis Pilato. La mensogo alvenas per mil maskoj. Hodiaŭ oni uzas ĝin kiel intencita misinformado. Ne nur la gazetaro frivole manipulas la verecon, ne nur politikistoj mensogas, ne nur en juĝejo regas la devizo:

„Ne parolu kontraŭ via proksimulo sen via advokato".

La oka ordono de la Biblio el certa kaŭzo intencis eviti, ke oni mensogas antaŭ la tribunalo. Ĝi ne nur direktis sin kontraŭ la malĝusta aserto, sed ankaŭ celis al kalumnio, mensogo.

Ankaŭ hodiaŭ oni mensogas en juĝejo, ke la muroj krakas (Z). *„Ĉiu homo estas mensogulo"* (Psalmo 116:11). Hodiaŭ malĝustaj asertoj ne plu estas kondamnitaj, ĉar ili estis tiel formulitaj de fakuloj, ke ili estas tuj apud la permesita limo.

La „kalkulita kalumnio" troviĝas en multaj artikoloj, libroj kaj sendaĵoj.

Estas evidente, ke la kalumnio akiris tute alian kvaliton en la epoko de medio, ĉar ili etendiĝas fulmrapide en ĉiun angulon de nia mondo. En tre akraj okazoj mortigo de reputacio povas esti kvazaŭ reala murdo.

Malĝustaj atestoj en formo de varbmensogoj estas ĉiutagaĵo: La varb-strategiistoj sugestas al la klientoj pli da sukceso ĉe beletaj inoj, se ili aĉetas certan aŭtotipon, ŝaŭmvin-specon, parfumon, ĉokolad-bonbonojn. Partipolitikajn programeldirojn oni intence formulas plursencaj, cele kapti tiom da balotantoj kiom eblas. Politikisto, kiu diras la veron kaj nenion promesas, estas nekredinda kaj tial, konsekvence, ne estas balotata.

## Pri la naŭa ordono:

*„Ne deziru la edzinon de via proksimulo".*

Ne deziru la edzinon de via proksimulo, ĉar oni logas vin per tiu avido en kaptilon. Ĉar estas hontege, ke la monavidaj varbantoj ne nur humiligas la virinon kiel seksa objekto, sed uzas ŝin ruzece kiel logaĵo. Sed tion ne ĝenas la varbstrategiistojn, ili kondutas kvazaŭ la naŭa ordono tekstus;

„Utiligu laŭforte la priinan avidon de via proksimulo".

Per la priina avido varbis ekspeda komercentrepreno pri aŭto-akcesoraĵoj. Longan tempon ili ofertis aŭtoseĝojn,

pneŭojn kaj aliajn objektojn. Iutage decidis la firmao, ne plu akrigi la katalogon per „nudaj katinetoj". Ili preferis propagandi per akre metal-brilantaj robotoj. Sed, ho ve! la enspezoj abrupte sinkis. Senpere ili revenis al postaĵeto kaj mamo — kaj ree tintis la kaso. Tiel la varbistoj restis ĉe la metodo, trakti la viran celgrupon kvazaŭ azeno, kiu ekkuras, kiam oni tenas karoton antaŭ la buŝegon. Ĉie logas knabinoj, kiuj ne estas haveblaj, per ĉarmaj pozoj, kiuj fakte vekas avidon pri tute alia objekto.

Ŝajnas strange, ke la peko kontraŭ la seks-moralo estas dividita en du ordenojn, en la sesan kaj la naŭan. Sed en la tempo, kiam la dekalogo estis skribita, oni intencis per la naŭa ordono gardi posedon de la viro. La malnova formulo sub Eliro 20:17 tekstis: „Ne deziru la domon, edzinon, servanton, servantinon, bovon de via proksimulo". Jen la edzino apartenis al la inventaro.

Pornografio estas senhonta prezentado de seksaĵo. Ĝi estas indiko pri estanta prudeco kaj signo de seksa anomalio.

En tia okazo utilas memorigi, ke la tuta komplekso amo, erotiko kaj sekso servis origine al la generado, kvankam ni intertempe sekvas aliajn ideojn.

### Pri la deka ordono:

*„Ne deziru la domon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo".*

En la epoko de avido kun ĝia mentaleco „kiu havas nenion, estas nenio" ekzistas nur unu problemo: Kiel havigi al si alies monon. Tio do signifas, ke la aviduloj trompas la avidulojn. Ilia deka ordono tekstas:

„Vi devas inciti la avidon de via proksimulo, por forkapti de li domon, agron kaj per tio fariĝi el bovo azenon".

Laŭ Predikanto 5:10:

*„Kiu amas monon, tiu ne satiĝos per mono; kaj kiu amas riĉecon al tiu ĝi ne donos utilon: ankaŭ tio estas vantaĵo".*

Tio signifas: sufiĉo ne plu sufiĉas, ĉiu postulas ne malpli ol ĉion. Estas ĉefe la riĉuloj, kiuj celas pliriĉiĝi, kie ajn estas la okazo.

La verdeta duonfrato de avido estas la envio. Kion ni estus atingintaj, se la laboristoj ne estus enviaj kaj kontentiĝus per la salajro, kiun la entreprenistoj donis al ili? Sendube, la fabrik-posedanto ne mallongigis la labortempon kaj faciligis la laboron kaj plialtigis nian vivnivelon, se ne la sindikato forte premis lin. Pelita de avido kaj envio agas la interesunuiĝoj. Sen avido kaj envio ne ekzistus socia justeco kaj socia paco.

La kapitalistaj kanajloj en la usona TV-serioj „Dallas" kaj „Denver" montras, kiel oni prirabas kaj trompas homojn, same la alte ŝatata „Monopoly-ludo". Transformite en la realan vivon estiĝas tute alia bildo. Ĉar jen ne ekzistas venko, kiu ne ŝarĝas nian proksimulon. La diferenco al la TV-ludoj estas, ke temas pri vivantaj homoj, kiuj perdas sian ŝparitan monon, laborlokon, domon — ili fariĝis senkulpaj kaj senhelpaj viktimoj.

La avido progresigis la homaron. Sed intertempe komprenis eĉ la plej stulta homo, ke la kreskanta ekonomio detruas neregenereblajn krudaĵojn kaj energion kaj ke la tero transformiĝas en gigantan rubejon.

### Finaj rimarkoj

Estas nekontestebla fakto: La dekalogo de Moseo signifis grandan paŝon antaŭen en la civilizacia historio. Sed ĝi devenas el tempo kaj mondo, kiu ne estas komparebla kun la nia. Ankaŭ tiam nur malmultaj homoj observis konsekvente la dekalogon. La konstanta plendo de la profetoj pruvas tion.

La menciitaj ekzemploj prezentas maltrankviligan staton. Mia prelego montras, kiel sensenca estus, deklari la dekalogon malnoviĝinta. Neniam ĝi estis tiel necesa kiel hodiaŭ kaj ni agus saĝe, trakti la dekalogon pli serioze.

Dieter Hartig

## LA NUMERADO DE LA DEKALOGO

En la tabelo, citita el la *Terminaro por Bibliaj studoj* de G. Rust kaj D.Broadribb, eldonita en 1973, de IABO, ni povas vidi ke la manieroj kalkuli la numerojn de la dek ordonoj varias.

1a sistemo: la Judoj
2a sistemo: Flavio Josefo, Filono, la Ortodoksiuloj, la plej multaj Protestantoj
3a sistemo: la Romkatolikoj kaj la Luteranoj (sistemo uzita en ĉi tiu artikolo)

| Eliro 20 | 1a sistemo | 2a sistemo | 3a sistemo | Readmono 5 |
|---|---|---|---|---|
| 2: Mi estas Javeo... sklaveco | 1 | | | |
| 3: ne aliajn diojn<br>4–6: ne faru idolojn | 2 | 1<br>2 | 1 | 7–10: nek aliajn diojn, nek idolojn |
| 7: la nomo de Javeo | 3 | 3 | 2 | 11: nomo de Javeo |
| 8–11: sabato | 4 | 4 | 3 | 12–15: sabato |
| 12: gepatroj | 5 | 5 | 4 | 16: gepatroj |
| 13: ne mortigu | 6 | 6 | 5 | 17: ne mortigu |
| 14: ne adultu | 7 | 7 | 6 | 18: ne adultu |
| 15: ne ŝtelu | 8 | 8 | 7 | 19: ne ŝtelu |
| 16: malvera atesto | 9 | 9 | 8 | 20: malvera atesto |
| 17: ne avidu ion | 10 | 10 | 9<br>10 | 21: ne avidu edzinon<br>ne avidu propraĵon |

## Pripensoj pri la preĝo „Patro nia"

*Patro nia,*

Mi dankas Dion, kiu igis el ni familion, gefratojn de la sama familio.

*Kiu estas en la ĉielo,*

Kvankam Li estas en al ĉielo, kvankam li estas tre potenca, li zorgas pri ni, kiel zorgas patro pri siaj infanoj.

*Via nomo estu sanktigata.*

Mi estas danka, ĉar Jesuo mortis por mi. Li vivas en mi, kaj li estas liberiginta min el la peko. Neniu alia povis fari tion por mi.

*Venu via regno, plenumiĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.*

Kiam tio jam okazis, se ne dum la komencanta eklezio de la Agoj de la apostoloj? Ili helpis sin reciproke. Se iu ne havis ion por manĝi aŭ vesti sin, oni donacis al li. Eĉ la nefidantoj de tiu tempo konsciis pri tiu fakto. Se tio okazis dum tiu periodo, tio povas ankaŭ okazi nun. Inter la Kristanoj oni povas vidi la regnon de Dio, eĉ se ekster ili, kaj en ili oni vidas la mondon.

*Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ*

Mi dankas Dion, ke mi hvas sufiĉe por manĝi, eĉ ke mi povas helpi aliulojn.

*Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.*

Mi dankas Dion, ĉar Li estas pacienca por mi, li pardonas ĉion. Dio helpu min pardoni ĉion al miaj gefratoj en Kristo.

*Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin el la malbono.*

Philippe DE VOS

## Kelkminuta meditado

*De 1950–1971 Hannes de Graaf (1911–1991) estis prezidanto de la nederlanda organizaĵo Eklezio kaj Paco. Li vivis kiel ĝisosta pacifisto, sed lia pacifismo ne estis rigida sistemo. Por li esencis, ke 'fari pacon' kongruas kun: iri vojon en la piedsignoj de Kristo. Kiel liberal-protestanta pastoro li sindediĉe laboris ankaŭ en Indonezio. De 1955–1976 li profesoris pri Etiko en la Utreĥta Teologia Universitato. Lian laboron por la paco karakterizis malferma kaj dinamika alproksimiĝo. Mi citu kelke da tekstoj el lia ampleksa verkaro.*

Kontraŭkulturon kontraŭ perforto oni en la nuna tempo pli konscie kaj radikale alstrebu. Ĉar la homaro suferas sub perforto. Unuavice en la senco plej laŭlitera; kaj viktimoj kaj rifuĝintoj de la dekoj da militoj sur nia planedo post la fino de la dua mondimilito plurmilionas.

La horizonton de la homa ekzistado krome venenas perforto, kiun stokadas la grandaj mondpotencoj. Ĝi minacas la homaron kai eĉ la vivon per definitiva kripligo. Al la spirita misrikolto de ĉi tiu stokita perforto apartenas la nihilismo, apartenas la avida fingrumo al tuja ĝuado, 'ĉar morgaŭ ni povos atendi la frapegon', apartenas ankaŭ terorismo kaj banditismo. Kaj surbaze de perforto subpremantaj reĝimoj estas konstruataj, kaj de maldekstre kaj de dekstre,

Unua paŝo povus esti, ke homoj rezignu pri ĉiu pravigo de perforto. Pravigo de perforto estas laŭ tiu grado pli malbona ol perforto mem, ĉar ĝi silentigas la konsciencon kaj kovras la apertan vundon kiun kaŭzas. la suferoj sub



## Preĝo por ĉiu tago kompilita de Jelly KOOPMANS-SCHOTANUS en la jaro 1969

Temas pri eksterordinara preĝaro kun multvaria alparolo de Dio. Sekvas ekzempla preĝo kaj poste la aliaj, en la libro uzitaj alparoloj.

*Patro, grandigu mian koron kaj riĉigu mian amon, por ke mia vivo similu al ombroriĉa arbo, kie lacaj promenantoj trovas ripozon kaj refreŝiĝon.*

Patro nia; Mia Patro; Patro de ĉiu bono; Patro de la amo; Sankta Patro; Patro de ĉiu kompatemo; Patro de ĉiu vivo; Patro de ĉiu graco; Sankta Dipatro; Patro de ĉiuj infanoj; Patro de la komenco kaj de la fino; Patro de la malriĉuloj; Patro de ĉiuj homoj; Patro de la lumo; Amata Patro; Kara ĉiela Patro; Eterna Patro; Ho, kompatema Patro; Patro de la granda kompato; Kuraĝiga Patro; Ĉiela Patro;

Kara Jesuo; Sinjoro Jesuo; Jesuo Kri-

perforto, Kaj ĝuste de el la homaj konscienco kaj suferoj ade kaj ade komenciĝu la fortostreĉoj por serĉi kaj trovi alternativojn.

Oni povas ankoraŭ kompreni kaj empatii, ke homoj en perforta situacio ne vidas aliajn eblojn por rezisti ol uzi perforton. Sed ĉu ili aldone havu pri tio ankaŭ bonan konsciencon? Kaj eĉ pli malbone: cu homoj, je granda distanco spektantaj, pripensu pravigajn adjektivojn por perfortado defenda, liberiga, ordoripara aŭ preventa? Perforto estas malhumaniga!

Tradukis: Jacques TUINDER

Heemskerk, 14.01.2003



sto;

Ho, Eternulo; Sinjoro, Reĝo de la paco; Reĝo de la gloro;

Dio, eterna lumo; Dio de la lumo; Dio de ĉiu kompato; Dio de la amo; Dio de la forto; Graca Dio; Ho, amanta Dio; Ho Dio, mia Patro; Eterna Dio; Granda Dio; Perfekta Dio; Ĉiopova Dio; Potenca Dio; Plej potenca Dio; Forta kaj potenca Dio; Kara, aŭskultanta Dio; Kompatema Dio; Mizerikorda Dio; Riĉa Dio; Saĝa Dio;

Riĉa Dio; Patro de la malriĉuloj;

Kara Kreinto; Nobla Reganto de la mondo; Plejpotenculo; Mia Majstro; Kompatema, kruciĝinta Savanto; Kristo, mia Reĝo;

Amplena Sinjoro; Amanta Sinjoro; Releviĝinta Sinjoro; Mia Sinjoro kaj Savanto; Savanto de la mondo; Kara aŭskultanta Sinjoro; Kompatema Sinjoro;

Ho, Sankta Spirito; Viviganta Spirito; Spirito de la amo; Graca Spirito.

# KIEL NI LEGAS NIAN BIBLION?

Antaŭ multaj jaroj mi apartenis al grupo, kie ni, tiamaj gejunuloj tre serioze okupiĝis pri la Biblio. Post interna travivaĵo, ke Jesuo Kristo por ni persone venis al ĉi tiu mondo, kaj ni estas savitaj, ni ĉiuj konpreneble sincere volis sekvi Lin. Niaj gvidantoj konsilis al ni ĉiutage legi la Biblion. Ankaŭ nun ekzistas tiaj gvidlibretoj, kiujn ni uzis tiam, kiuj diversmaniere dividis la tekstojn, por ke ni tralegu, ekkonu la tuton.

Foj-foje ni spertis, ke la tiutaga Biblia Vorto ekbrilis — fariĝis ĝuste aktuala vojmontrilo. Kia ĝojo tio estis! Sed plej ofte ni spertis „nur" ke iu bonfara silento plenigis la koron, eble nur dum la laborplena kurado de la tago aperis la matena atentigo aŭ kuraĝigo, Kelkaj el ni komencis perdi la interesiĝon. Ja, oni emas ĉiam travivi ion emocian. Parolante pri tio kun nia pastoro, ni ricevis interesan instruon, kiu ekde mia junaĝo eĉ hodiaŭ restis aktuala.

1. Ne pensu, ke vi ĉiam devas akiri iun emocian travivaĵon dum la legado de la Biblio, kaj nepre ne imitu tion, kvazaŭ vi estus ĝin ricevinta! Ne pensu, ke ĉiujn viajn ĉiutagajn farojn kaj decidojn vi tiel devas komenti: „tion mi ricevis de la Sinjoro". Jesuo mem apelacias pri nia sobra, homa menso: „kial vi ne scias de vi mem?" Kompreneble ni rajtas peti saĝecon, kaj en la silento de sincera koro fari niajn decidojn. Sed la Vorto ne ĉiam eksonas!

2. Kiam vi diligente kaj fidele legadas vian Biblion, historietoj, kazoj, vortoj viciĝas en via memoro. Tiel ili silentas unu apud la alia kiel klavoj en la klavaro de iu mirinda fortepiano. Vi eble eĉ ne scias jam pri tio, ke ili troviĝas en via memoro. Sed iam, kiam la Sinjoro volas alparoli vin, la Sankta Spirito ektuŝas iun klavon kaj en via koro laŭte eksonas la Biblia Vorto adresita rekte al vi! Kiu jam travivis tion, tiu scias pri kio mi parolas!

Do kolektu ĉiam pli da klavoj por via klavaro! Ne por fanfaroni pri via kono! Sen la Sankta Spirito tiuj restas nur vortoj. Nur la Sankta Spirito faros el ili Vorton, sanktan harmonion en via vivo.

3. Ankaŭ povas okazi, ke iu historio, iu Biblia instruo vekas kontraŭstaron en nia animo. Ĉu tiam ni hipokrite faru tiel kvazaŭ ni akceptus tion? Ĉu ni kredu tion, kion ni trovas absurda?

Aŭ ĉi tio fariĝu stumblilo pro kiu ni falas kaj ne plu povas/volas pluiri? Certe ankaŭ vi konas homojn, kiuj ne povis plu sekvi instruojn de Jesuo, ĉar ĉe iu nekomprenita kazo ili indigniĝis, haltis kaj devojiĝis.

Iun tre simplan instruon ni ricevis iam de nia pastoro pri tiaj kazoj: „Pensu pri tio, ke vi manĝas iun bongustan manĝaĵon, sed vi trovas en ĝi pecon da osto. Kion vi faras? Ĉu vi suferante klopodas manĝi ankaŭ tion? Aŭ ĉu vi forĵetas la tuton pro la osto? — Metu ĝin sur la randon de la telero, kaj daŭrigu trankvile la manĝadon!"

Ankaŭ dum la legado de la Biblio kelkfoje kiam ni renkontas problemojn, ni rajtas diri: „Kara Patro, tio nun ne nutras min, pardonu min kaj permesu ke mi tion flankenmetu". Povas esti — ni, kelkaj malnovaj kristanoj jam spertis, — kiam jarojn poste la Sankta Spirito prilumas tiun historion, kiu siatempe ŝokis nin, ne estis komprenebla, kaj subite tio fariĝas Dia Mesaĝo.

Do, legu vian Biblion humile kaj fidele, sciante ke la Eternulo atentas pri vi kaj kelkfoje aperas en la silento.

Éva Farkas-Tatár

## kristo@trono.de.graco.ĉielo

Jen la epoko, kiam mesaĝojn oni povus facile sendi de unu loko al alia, ne gravas la distanco. Tamen foje forpasas aŭ nur sekundoj aŭ minutoj aŭ horoj... aŭ jaroj antaŭ ricevo de la respondoj, foje pro cirkonstancoj kiujn homoj ne kapablas superi aŭ malebligi.

Tamen, neniu elektronike sendita mesaĝo iras tiom rapide kiom sincera preĝo de fidela servanto de Dio, sendita en la nomo de Jesuo Kristo, nia Peranto, kaj estas certe ke respondo venos ĝustatempe.

Ĉu vi jam provis kontakti Lin? Tiel faru, se vi neniam faris: kaj Li senhezite respondos vian sinceran preĝon.

La sekvantaj, inter aliaj, estas bonaj pasvortoj, per kiuj vi povus facile malfermi la pordegojn de la Ĉielo:

*Petu, kaj estos donite al vi; serĉu, kaj vi trovos; frapu, kaj estos malfermite al vi; ĉar ĉiu petanto ricevas, kaj la serĉanto trovas, kaj al la frapanto estos malfermite* (Mateo 7:7-8)

*Voku al mi, kaj mi respondos al vi, kaj mi sciigos al vi grandajn kaj gravajn aferojn, kiujn vi ne scias* (Jeremia 33:3)

*Kaj estos tiel, ke antaŭ ol ili vokos, mi respondos; ili estos ankoraŭ parolantaj, kaj mi jam aŭdos* (Jesaja 65:24)

*Ĉar: ĉiu kiu vokos la nomon de la Eternulo, saviĝos* (Romanoj 10:13)

Kontaktu nun la Ĉielan Reton (t.e. la Trono de Graco) per tiuj pasvortoj Bibliaj, kaj tenu la kontakton.

Kara ricevinto: Mi havas Dian komision per literaturo rete progresigi la Regnon de Dio, sed ne havas rektan aliron al la reto ĉar ĉe publika butiko mi sendas kontraŭ pago. Mi do petegas, ke vi transsendu ĝin al tiom da homoj, al kiom vi povus (kaj se eble disponigi por gazeta eldono); kaj vi tiel helpus progresigi la Regnon Dian. Ne rompu la ĉenon! Transsendu ĝin! Komuniku kun mi se ankaŭ alimaniere vi povus kunlabori — sed pro kosto mi ne emas uzi la reton. Antaŭdankon!

## LEVU L'OKULOJN

Levu l'okulojn al la monto
Kie troviĝas la fonto
De daŭra beno kaj paco
Tie estas Di' de graco.
Li lumigos vian vojon
Kaj certe ĉiun la fojon
Kiam la valon vi trapasos
Vin Li neniam forlasos.
Pro la Dia rolo garda
Li neniam estas tarda
Kiam helpon bezonas vi
Apud vi ĉiam staros Li.
Levu l'okulojn al la monto
Al nesekiĝebla fonto
Li donos al vi abunde
Kaj satigos vin ĝisfunde.

Olúwábùnmi Gabriel Òshó-Davies

Sur strato Yaohang troviĝas novkonstruata preĝejo sed ne finkonstruita ankoraŭ. Urĝe tamen la 21an de septembro 1999 okazis la solena celebro ordinii 8 novajn sacerdotojn, inter kiuj 2 estas Shanscianoj, kies gepatroj kaj geparencoj unuanime postulis samdiocezan episkopon ordini siajn filojn novsacerdotoj. Tiu ĉi informo ekfluas ĉien. Kaj diversaj lokaj homoj altiras al si la atenton de multaj fideluloj, sed Ningbo-preĝejo okupiĝas pri preparado de ĉio ĉi tio. Unue balai kaj purigadi rubaĵojn kaj necesajn ornamaĵojn.

La limdato alvenas. La fideluloj apartenas al la diocezo de Ningbo, kies ĉirkaŭaj gubernioj, urbetoj kaj vilaĝoj kolektiĝis ĉi tie.

Ĉar ĉi novpreĝejo situas ĉe granda vojo kaj kun duobla turpinto, altas 85 metrojn tro (tre?), igas trapasantojn atenti kaj interesi precipe amasiĝas la fideluloj. Venas 2 episkopoj kaj multaj pastroj kaj monaĥinoj. Unu el du episkopoj estas Xian-urba, alia tamen el alia urbo de provinco Shanci.

Origine, ĉi preĝejo estis planata por 2800 personoj. Fakte homoj, fideluloj, spektantoj multobliĝas. Se ne estus ŝtalbetona konstruo, ĝi certe detruiĝus.

Speciale atentiga estas iu fanfaro, kiu konsistas el vilaĝanoj staras sur ĉe pordego de novpreĝejo; tiam kiam nombre da fideluloj eniras, la ensemblo tuj ekludas por esprimi bonvenigon. Mirindige: inter ili troviĝas direktanto, kiu ne estas plenkreskulo sed altaĝa oldulo, ŝajne li perfekte primajstras tian arton.

Laŭ anonco la liturgio komenciĝas la 8.30, tamen jam je la 6a fideluloj ope alvenis en la preĝejon. La Ningbo-anoj kiel gastigantoj ĝentile cedas la sidlokon al foraj fideluloj. Mankas sidbenkoj, ĉar oni ne finfaris ilin. Benkoj estis transportitaj per ŝarĝaŭtoj, kaj reportitaj post la solena liturgio. Ĉi tiun fizikan laboron faras ningboanaj junaj gefideluloj precipe junaj fidelulinoj, kompreneble senpage kaj memofereme, unuanime por la gloro de Dio, al Jesuo Kristo kaj al dioceza eklezio.

Ĉar estas multe da ŝtupoj antaŭ la preĝej-pordego, kaj mi jam aĝas 87 jarojn, iri supren kaj malsupren estas al mi danĝere. Mi bezonas aliulon por min akompani. Laŭdire estontece lifto ekipiĝos por gemaljunuloj kaj gemalsanuloj; tiam estos oportune. Sed nuntempe ankoraŭ ne.

La tuta konstruo finiĝos eble en venonta jaro, ĉar internaj ornamaĵoj bezonas multe da tempo kaj laboro.

Karaj legantoj, atendu poste mi raportos ree kaj Bonvenon al Ningbo!

Petro KAIZ

Ningbo, Ĉinio

## KELI-PREZIDANTO HELPOCELE VIZITIS EKSAJN INFANSOLDATOJN EN SRILANKO

Legante la paragrafon, kiun la Jarlibro de Amnestio Internacia 2001 dediĉis al Srilanko, oni ne devas ne konkludi ke la dudekjara terurega intercivitana milito al neniu alportis benon kaj bonon. Ĝi ege turmentis kaj skurĝis landon kaj popolon. Ĉie kaj ĉiunivele mankas respekto al homaj rajtoj.

Fondaĵo E-vid-E-nt-E jam depost 1996 havas kontakton kun kelke da tieaj projektoj, ĉefe en la norda parto de la lando, kie loĝas Tamiloj. En majo 2002 ni oficiale malfermis Instituton por Vidhandikapitaj Infanoj, Dharisanam, en Batticaloa. Ni tiam volis viziti la Jaffna-provincon, sed la aŭtoritatuloj tion malpermesis. Danke al provizora packontrakto inter ambaŭ etnoj tio nune eblas. Ho, kiom da teruraĵoj ni vidis! Ĉie bombe ruinigitaj domoj, detruita vojaro, grave handikapitaj homoj (sekve de la ĉieaj teraj minoj), soldatoj, kelkfoje kun armilo akompane kunvojaghantaj en nia aŭto. Kaj nelaste: militvidvinoj kaj orfoj.

Nin invitis la estraroj de la Domo por Blinduloj Vaazhvaham en Chunnakam kaj la Kampara Rekonstrua Societo en Mallakam, tuj apud la ĉefurbo Jaffna. Forlasinte la aerhavenon en Colombo ni bezonis preskaŭ kompletan tagon por atingi nian celon. Kunvojaĝis Evidente-estrarano Cor DEKKER, jam al multaj esperantistoj konata konstru-specialisto. Li forte helpas al projektoj en Albanio, Bulgario, Moldavio kaj Srilanko. Kaj optikisto Jan PLUIMERT, nova kunlaboranto kiu diligente kaj sindediĉe ŝvitis sub brulanta suno. Li povis helpi al centoj da malriĉaj homoj per okulvitroj. Unu kofro, plena de lego- kaj sun-okulvitroj, tute elĉerpiĝis. Ni renkontis multe da kataraktuloj, al kiuj povas operacie servi nur okulisto. Sed neniu havas la monon (= ĉirkaŭ 100 eŭroj) por pagi la por ili altegajn kostojn.

Por mi estis bone vidi, ke la senditaj monsumoj estas elspezitaj en plej efika maniero. La ĉefino de la porblindula instituto, s-ino A. SINNATHAMBY, rondgvidis nin, eksplikante kaj informante. Fakte la konstruaĵo estas multe tro malvasta, sekve urĝe necesas pligrandigo. Cor kliniĝis super planoj kaj desegnoj kaj kalkuloj. Mia tasko estas denove serĉi fondusojn, tuj kiam mi residos malantaŭ mia skribotablo. Ni regalis la ĉarmajn kaj kolore vestitajn infanojn per donacoj, lernejbezonaĵoj kaj festmanĝo. Kaj ili venĝis per spektakla vesperprogramo, prezentante kantojn, dancojn kaj deklamojn.

Novaĵo en mia multjara agado estis invito de la srilanka armeo viziti Instituton por Reedukado kaj Fakinstruado al eksaj infansoldatoj. Ho, kiom travivis tiuj kompatindaj knaboj kiuj — kelkfoje nur 12-jaraĝaj! — lernis uzi pafilon! Jan zorge mezuris kaj kontrolis multajn okulojn, iliajn sed ankaŭ de parencoj, amikoj, gvidantoj, instruantoj, ktp.

### KAJ MOLDAVIO...

La kontaktoj de nia organizaĵo kun Moldavio estas daŭraj kaj firmaj. Multaj scias, ke en majo venonta ni vizitos ĉi tiun landon, ekonomie plej malfortan landon de Eŭropo, kun teamo kvinpersona: brajlopreseja fakulo, okulkuracisto, du optikistoj kaj mi kiel kunordiganto. Ni ricevis oficialan inviton flanke de la Justic-ministerio por eniri ĉiujn malliberejojn, helponte al prizonuloj ĉu per operacio ĉu per okulvitroj.

Problemo estas stato de kronika subnutrado, pro manko de A-vitamino ofte kaŭzanta grandajn sekvojn por la okuloj. Cetere, la Sportfederacio de la moldava Asocio por Vidhandikapuloj petas serĉi sponsorojn, kiuj ebligu partoprenon de dek blinduloj kun iliaj akompanantoj al la Paralimpikaj Ludoj en Ateno (2004). Mi scivolas, ĉu inter sportemaj esperantistoj troviĝas homoj bonkoraj kaj malavaraj! Nu, mi estas certa pri tio...

Tre mi dankas al mia komunumo Heemskerk, kiu denove disponigis monsumon. La urbestraro jam por la naua fojo donis financan subvencion al nia laboro. Kie restas la aliaj komunumoj?

Laste: ni serĉas novajn sponsorojn, ebligantajn radikalan renovigon de etaĝodomego por vidhandikapuloj en Moldavio, kiu rapide estas ruiniĝanta. Por tiu projekto ni petos helpon de la nederlanda registaro, de Fondaĵo „Sovaĝaj Anseroj" kaj de la Heemskerka Revendejo-por-bonaj-celoj.

## „Eĉ en la malliberejo ni mezuris okulojn"

La kvindek-jara Wim SCHOUTEN kaj eks-kolego Henk Bertens (68) vojaĝis en septembro 2002 dum du semajnoj al la ekonomie malforta Moldavio por mezuri okulojn, fari receptojn kaj adaptigi muntumojn.

„Entute ni mezuris la okulojn de 600 personoj kaj povis helpi al 350 per okulvitroj, kaj tio estas grandioza — diras SCHOUTEN. — Precipe la malriĉaj homoj en Moldavio ne havas monon por aĉeti bonajn okulvitrojn; la samo validas por la malliberuloj, kiujn ni vizitis. Estis unika sperto povi oferti helpon en prizono".

Fondaĵo Evidente en Heemskerk petis al Henk BERTENS kuniri al Moldavio. BERTENS siavice invitis Wim SCHOUTENS por vojaĝi kune kun li. Ili kunprenis centojn da muntumoj kaj mobilan aŭto-refrakciilon, okulmezuris en socialaj entreprenoj, institutoj kaj en la Cricova-malliberejo.

„Mi vidis multe da okulistaj misoj — rakontas Wim SCHOUTEN. — Katarakt-operacioj estas nezorge farataj kaj per tio homoj povas perdi grandan parton de sia vidpovo. Al multaj el ili ni bedaŭrinde ne sukcesis helpi, sed al granda nombro da homoj malforte vidantaj bonŝance eblis. La lensoj estas farataj en Nederlando laŭ niaj receptoj kaj poste — enmuntigitaj — sendataj Moldavion. Estas nepre belega afero ke ni havas la okazon helpi al tieaj homoj!"

*Jacques TUINDER, prezidanto de Fondaĵo Evidente, ricevis inviton flanke de la ministro de justico en Moldavio reveni kaj viziti ĉiujn prisonojn por helpi al malliberuloj ĉu per operacio ĉu per laŭreceptaj okulvitroj. Al la teamo aldoniĝos okulisto havanta multe da oftalmologia sperto en evolulandoj. La misio okazos en majo venonta.*

---

Al ĉiuj karaj geamikoj de „E-vid-E-nt-E" mi varme kaj sincere dankas per elkoraj salutoj,

Jacques TUINDER

## Mi havis malsaton...

Mi havis malsaton kaj vi diris:
Ne tro petu kaj simple atendu.
Mi havis malsaton kaj vi diris:
Ni ŝtarigu novan komisionon.
Mi havis malsaton kaj vi diris:
Nenio ŝanĝiĝis en la mondo.
Mi havis malsaton kaj vi diris:
Eŝtas bona temo por prediko!
Mi havis malsaton kaj vi diris:
Ho, tio koŝtas laborlokojn.
Mi havis malsaton kaj vi diris:
Kulpas niaj merkat-meĥanismoj.
Mi havis malsaton kaj vi diris:
Ni sendu pulvorigitan lakton.
Kaj kiam Mi ĉion formanĝis,
vi diris kaj ripete diris:
- Kiam ili finfine ĉesos peti?
Ja eŝtas ilia afero, ĉu ne?

El *„De Brandnetel"* tradukis:
Jacques TUINDER

Nia tero sufiĉe produktas
por ĉies bezono,
sed ne por ĉies avideco.

M. GHANDI



## MATENA PREĜO

*Sinjoro, mi laŭdas Vin,*
Vi estas la mateno kaj la vespero,
la komenco kaj la fino de la tempo.
Vin mi dankas pro la ripozo dumnokta
kaj la lumo de tago nova.
Korpo kaj animo estas Viaj,
de Vi estas ĉio, kio okazas.
*Sinjoro, Jesuo Kristo, Vi lumo de la mondo,*
Vi estas la vojo, kiun mi iras hodiaŭ,
Vi estas la vero, kiu min gvidas,
Vi estas la vivo, kiun mi trovas.
Donu al mi Vian amon,
por ke mi retrovu Vin en la homoj.
Donu al mi paciencon kaj trankvilecon
kaj gardu min en Via amo.
*Sinjoro, Vi Kreanta Spirito,*
veku miajn sencojn kaj pensojn,
donu al mi fantazion kaj klarecon,
senteman konsciencon,
la ĝustan, helpan vorton
kaj la zorgeman agon,
por ke mi kreu utilon
kaj ĉi tiu tago ne estu perdita.
*Sinjoro, Sankta Dio,*
kion vi sendas al mi, mi akceptas,
sukceson kaj malsukceson, ĝojon kaj penon.
Mi petas Vin por ĉiuj,
kiuj komenciĝas ĉi tiun tagon kun zorgoj,
kun timo aŭ doloroj.
Akompanu nin, protektu nin. Gardu nin.
Mi dankas Vin pro Via nova tago.

## KIO VOLAS RESTI DEVAS ŜANĜIĜI

Kiel la maro, kiu restas
en malalta kaj alta tajdo
La arbo en la ŝanĝo de la sezonoj
La svinganta ponto
Sono

Kio volas resti devas ŝanĝiĝi

La vivo
Enspiri kaj elspiri
Tio, el kio mi ĉerpas forton
Miaj radikoj
Miaj vojoj

Kio volas resti devas ŝanĝiĝi

Amo, kiu havas tajdon kiel la maro
Amikeco
Feliĉo
Tasko
Sukceso

Kio volas resti devas ŝanĝiĝi

Miaj bildoj de la pasinteco
de la estonteco
de la senco
de Dio
Miaj plej gravaj bildoj
mi volas, ke ili restas

KIO VOLAS RESTI DEVAS ŜANĜIĜI

Eldonejo de „Agado 365", Frankfurt

# PREĜO POR LA PACO

Vi,
ni ne sukcesis
malebligi la militon.

Ĉu ankaŭ ne
Vi?

Ĉu ankaŭ ne
la morton
de Via filo?

Mi ne volas
mortigi.

Mi ne volas
ke Via nomo
misuzatas.

ne por kalkulita morto
ne por rompiĝo de internacia rajto
ne por misuzo de potenco
ne por posedo de nafto
ne por la morto de la vero
ne kontraŭ la rajto je vivo.

Mi ne volas
misuzi
Vian nomon
por mia avantaĝo.

Donu al ni la pacon
kiun la mondo
ne povas doni.

Amen.
Ŝalom!

Alois EDER
tradukis Robert WARE

# ĜIS REVIDO!

Ĝis revido, ĝis revido!
Plue jam simplas la voj'.
Ĝis revido, ĝis revido!
Vojo de ĝojo kaj plor'

Etendu viajn manojn,
Vent' kombu viajn harojn,
Suno vian memoron
konservos en kor'.

Ĝis revido, ĝis revido!
Tremas rivero kaj lag'.
Ĝis revido, ĝis revido!
Susuras nokto kaj tag'.

Etendu...

Ĝis revido, ĝis revido!
Baldaŭ disblovos nin vent'.
Ĝis revido, ĝis revido!
Profito estos aŭ perd'.

*NDLR: Bedaŭrinde, la aŭtoro ne menciis sian nomon sur la folio kun la teksto, kaj tiu disiĝis de la cetero de la sendaĵo inter la dokumentoj por la revuo. Mi do ne scias kiu verkis tion. La aŭtoro reindiku al mi, kiu li estas. Ĉar ŝajne tio estas strofoj de kanto, estus ankaŭ bone scii laŭ kiu muziko oni kantu ĝin.*

P.C.